



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 24** > • ILEI • Universitatoj • Muziko • Brazilo • Salutis EEU < **apr. 23**

## ILEI pretigis sian trimonatan raporton

Tio validas por la periodo de la 15a de januaro ĝis la 15a de aprilo, kaj alvenis jam en la 16a de aprilo! Jen resumo:

La preparoj por la kongreso en Kebekio progresas. La temo estas 'Dulingva kaj plurlingva edukado'. ILEI vokas por prelegantoj. La raporto donas grandan detalaron pri la ebloj.

Komuna projekto inter ILEI kaj UEA evoluas por kurso en Senegalio prepare al la 8a Afrika Kongreso, pri kiu EKO jam raportis kaj daŭre faros.

ILEI agas ĉe Unesko. Post sukcesa partopreno de la vic-prezidantino Alessandra Madella kaj Maximiliano Garcia en la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo novembro 2021 venis reagoj el kelkaj landoj. Precipe Sirio multe demandis pri UEA kaj ILEI, de turka ano de la Internacia NRO de universitataj studentoj pri juro venis intereso pri lernado de Esperanto kaj kunlaboro.

ILEI pri universitatoj: Tiu kampo vere evoluas. Ses-semajna serio da dulingvaj (en la persa kaj Esperanto) seminarioj okazis kun la titolo "Internacia retinariaro pri Turismo kaj Esperanto", organizita de la Scienca Asocio de la Universitato de Tehrano pri Turisma Administrado kun helpoj de UEA, ILEI, IrEA kaj kadre de IKIKO. La registraĵoj de la retinariaroj spektblas en la jutuba kanalo de UEAviva (ekzemple en [https://www.youtube.com/watch?v=OINwab-2\\_GU](https://www.youtube.com/watch?v=OINwab-2_GU)).

Dum ses semajnoj ĉiu-ĵaŭde okazis kvar prelegoj, el kiuj 14 estis fare de esperantistoj (pleje eksterlandaj: 9), kaj 10 fare de ne-esperantistaj profesoroj kaj doktoriĝaj studentoj de la Universitato de Tehrano, la unua kaj la plej granda universitato de Irano. ILEI-estraranoj kontribuis per 4 prelegoj.

ILEI daŭre kunlaboras kun Ĉina Radio Internacia (CRI) pri diskonigo de la agado.

ILEI estas plananta la Tagon de Lernado dum UK en Montrealo helpe de Maria Belošević el Kroatio kiel en lastaj jaroj.

ILEI fariĝos, kiel tradicie, Honora Patrono por la 10-a, jubilea, Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, gvidata de nia pola samideanino Małgosia Komarnicka, la Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. ILEI reklamas la festivalon.

Divers-lingvaj instruadoj de Esperanto, en la projekto "Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj" (<https://www.espero.ir/eo/kursaro/>) estas alŝutotaj en la kanalon. Por ties plenumado kunhelpos inĝ. Hamzeh Shafiee el IrLEI (la irana sekcio de ILEI). La projekto jam inkluzivas Esp-instruadojn en la franca, rusa, indonezia, vietnama, ĉina,



persa, araba kaj nur-Esperantajn kursojn de prof. Renato Corsetti (KER-B2) kaj s-ro Trevor Steele (KER-C1).

## Franca konferenco akceptos proponojn

La temo estas "Lingvaj interagoj en klasĉambroj kaj konstruado de scioj" Ĝi estas organizata de la Universitato de Lillo. La limdato por sendi kontribuojn estas la **10-a de majo**: <https://interact2022.sciencesconf.org/> (nur france)

Kaze ke iuj deziras partopreni aŭ kontribui... Kontribuaĵoj estas akcepteblaj en la franca kaj la angla.

Didier Janot, ILEI, Francio

## Universitata kunlaboro inter Kongo DR kaj Francio

Ni revenas al tiu projekto, raportita kun foto en EKO 23.

La projekto havas ĉi tiujn celojn:

1. Diskonigi la lingvon Esperanto kiel universitatilon, tio estas taŭgan lingvon por la esplorado, la edukado, la servo al la socio kaj la realigo de internaciaj retoj; kaj kiel nehegemonian komunikilon, kiu faciligas la stariĝon de internaciaj horizontalaj rilatoj.
2. Fortigi internacian kulturon universitatan, kiu reliefigu la gravecon de la lokaj lingvoj kaj provas rimedojn pri komunikado, kiuj ne favoras al iuj lingvoj super aliaj.
3. Kunlabori kun la Universitato de la Espero en la Demokratia Respubliko Kongo (Baraka regiono) pri ĝia institucia fortiĝo, per la komuna elekto de Esperanto kiel internaciigilo.
4. Helpi la stariĝon kaj la fortiĝon de ia internacia afrika reto de universitatoj, kiuj aranĝiĝas sub la gvido de Baraka, per Esperanto kiel universitata internacia komunikilo.

Maele, franca kaj klubanino, tradukos ĝin en la francan. Mi tiam kunhavigos la novaĵon en la vacapa grupo de la UEK.

## Brazila reviviĝo de KKE

Fine de marto okazis en Rio la ĝenerala asembleo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE). Tio estis la unua ĉeesta evento okazinta tie, ekde la komenco de la pandemio. La prezidanto, Givanildo Costa, videble kortuŝita, prezentis raporton pri la agado de la institucio dum la pasinta jaro. Poste li pritraktis la bilancon.

La advokato Hélder Lopes, eks-prezidanto de KKE, konigis la rezultojn de la lingvoinstruaj iniciatoj entreprenitaj de li kaj lia edzino, la profesorino Maria Amélia Ferreira, en la Federacia Universitato de la ŝtato Rio-de-Janeiro (UFF) kaj en lernejoj situantaj en la norda regiono de la tielnomata Mirinda Urbo. Poste, la esperantistino Célia de Gusmão, kiu estis enpostenigita kiel anstataŭanto en la kontrola konsilantaro, salutis la ĉeestantojn.

En la fino de la kunsido, la radioparolisto Fabiano Henrique estis elektita vic-prezidanto. Unu el liaj unuaj celoj estas restarigi la cirkuladon de la revuo InKo. Por

plenumi tiun taskon li petis la kunlaboron de ĉiuj membroj. En lia listo de farenadaĵoj estas ankaŭ la pliigo de la agado de KKE ĉe interreto, speciale en socia medio.

Redaktoro: Fabiano Henrique

Retejo: Esperanto Ilustrita

Blogger: <http://esperantoilustrita.blogspot.com/2022/04/kultura-kooperativo-de-esperantistoj.html?m=1>

Facebook: <https://www.facebook.com/1051025248281747/posts/5467378216646406/>

Instagram: [https://www.instagram.com/p/Cb8Eh3wraj-/?utm\\_medium=copy\\_link](https://www.instagram.com/p/Cb8Eh3wraj-/?utm_medium=copy_link)

## Ikona muzikpeco el la granda pomo (la alia POMegO)

Alkliku: [YouTube - Novjork', Novjork' / New York, New York](#)

Tre fama usona kanto tradukita al Esperanto de Vicente Valdés Bejarano.

Kantas Ĉente. Retrovita de SMG el 2008 dum reteja purigo. Vera juvelo! Gratulon al ĉiu! Provu ankaŭ: [https://www.youtube.com/watch?v=P2x\\_jd7EEms](https://www.youtube.com/watch?v=P2x_jd7EEms)

## Plue kun la muzika nostalgio

Imagu – *Beatles* de Manuel Rovere

<https://www.youtube.com/watch?v=jKzEbwiFjYA>

La Sono de Silent' (Simon/Garfunkel)

[https://www.youtube.com/watch?v=czIM1\\_CTqPQ](https://www.youtube.com/watch?v=czIM1_CTqPQ)

Halehulja (Leon Cohen)

<https://www.youtube.com/watch?v=oPtT4upFAaw>

Hieraŭ *Beatles*. (Lennon/McCartney)

<https://www.youtube.com/watch?v=oPtT4upFAaw>

Ĉiuj kun klaraj kanttitoloj, ege utilaj por uzo en Eo-kursoj.



## Seán Ó Riain salutas la hungarojn

Mi ŝatus sincere gratuli la Hungarian Esperanto-Asociacion pro la 120-a datreveno de ĝia fondiĝo, kaj deziri al vi sukcesan kaj ĝojplenan feston. Hungario okupas ŝlosilan lokon en la historio de la Esperanto-kulturo kaj komunumo. Via bela lando produktis la literaturan genion de Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy, de István Nemere kaj de multaj aliaj unuaklasaj verkistoj. Kiam rolo ie ajn estas proponita por Esperanto, la



ĉefa argumento de la kontraŭuloj estas ke "*ĝi ne havas kulturon*". Ni, Esperanto-parolantoj, scias, ke tio malveras kaj ege maljustas. La plej efika maniero kontraŭbatali tiajn nepravigeblajn atakojn kontraŭ Esperanto estas la oficiala agnosko, fare de sendependaj ŝtatoj, de Esperanto kiel parto de la nemateria kultura heredaĵo de pli kaj pli da eŭropaj landoj, kaj de Eŭropo. Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) jam faris tiun ĉi paŝon, kiu egalas al oficiala agnosko de Esperanto kiel lingvo de kulturo. Aliaj EU-landoj, kiel Litovio, Ĉeĥio kaj Slovakio laboras en la sama direkto.

Sukcesa oficiala agnosko de Esperanto en Hungario donus grandegan akcelon al nia lingvo. Ĉi tio estas nia unua prioritato. Mi ege ĝojas pro la unuaj jam konkretaj, oficialaj paŝoj esperplenaj faritaj de vi kiel prezidanto de HEA al la deklaro de tradicioj esperantistaj kiel Nacian Kulturan Trezoron de Hungario. La vojo estos longa kaj malfacila kaj ĝi postulos fortan unuecon de la tutlanda hungara movado, kaj de ĉiuj hungaraj Esperantistoj.

Mi deziras al la Esperanto-movado en Hungario daŭran sukceson, kaj mi certigas al vi la fortan subtenon de EEU por ĉiuj viaj laboroj por Esperanto kaj por lingva justeco en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

Dr Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU (sur la foto el 2014 en Krynica, Pollando)

## Magistraj studoj en Poznano

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj.

Titolo: Poznano lanĉas dujarajn magistrajn studojn pri interlingvistiko

Kategorio: Laste en la movado

En la Adam Mickiewicz-Universitato (AMU), en Poznano, Pollando jam de 1998 funkcias internaciaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj. Por la studjaro 2022/23 estas planate startigi 2-jarajn magistrajn studojn por internacia studentaro pri interlingvistiko enkadre de la fakto Lingvistiko kaj Informmastrumado (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj).

Legu pli ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=870>

## Kongo pledas por libroj

En Lumumbashi, la dua plej granda urbo de Kongo DR, fondiĝis Esperanto-klubo. La urbo troviĝas tute en la sudo de la lando. Nun la klubo bezonas lernolibrojn en la franca aŭ suahila, vortaretojn kiel 'poŝ-amiko' kaj ankaŭ legomaterialon. Liberigu viajn librokolektojn kaj helpu Esperanton en Afriko:

Urbo: Lubumbashi; Poŝtkesta numero: 1023; Telefonnumero: +243 972 716 042.

En Kongo ne ekzistas "Poŝtkodoj". Se vi havas demandojn, bonvolu starigi ilin.

[Espoir Kasati <espoirkasati <ĉe>gmail.com>](mailto:Espoir Kasati <espoirkasati <ĉe>gmail.com>)

*Pri 'Poŝamikoj' EKO kontaktos kun <edukado.net> kiu eldonis la verkon.*

Mi rimarkas, ke preskaŭ la tuta enhavo de ĉi tiu komuniko temas pri la eduka kampo: la bonega nuna laboro de ILEI, la universitatoj, kontaktoj inter Eŭropo kaj Afriko, precipe pri lerniloj kaj kursoj.

===== vortoj: 1350 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.